

RAPORTO

Koreio (Korea Respubliko) estas trovebla en la parto orienta de Azio, kiel oni konas Sud--Koreio. Ĉi tiu situas en la suda parto de la Korea duoninsulo. Ĝin limas norde Nord--Koreio, oriente la Japana maro (Orienta -maro), sude estas trovebla la Korea markolo kaj oriente la Flava maro. En la orienta kaj suda partoj ĉirkaŭas ĝin multaj etaj insuloj.

Koreio situas en la mezvarma zono. Ĝia klimato estas milda. La ŝtatformo estas Korea prezidanta respubliko. La prezidanton oni elektas je kvin jaroj, kaj li estas ankaŭ la komandanto de armeo, kiu servas nur unu terminon. Kio estas la ŝtato-strukturo de Koreio?

La administracia dispartigo de Koreio:

konsistas el ok provincoj sendepende, diverse, plej alt-nivele. La oficiala lingvo de Koreio estas korea, ĝi nomiĝas „hangugo”. „Hangul” signifas hungarlingve aboco. Ĉi tiu konsistas el dudek kvar literoj.

La historio de Koreio

En la nuna teritorio de Koreio antaŭ nia erao (a.n.e.) ĉirkaŭ mil cent (1100) regis Kidĵa reĝo, kaj li fondis la unuan dinastion. Dum la regado antaŭ nia erao sescent sesdek ok (668) unueca ŝtato en Koreio ekzistis, kiel princ-lando de Ŝilla. Ĝin atingis eksteraj efikoj de Ĉinio, kiel la budhismo, konfuciismo kaj aliaj ismoj.

Japanio okupis Koreion en mil naŭcent dek (1910). Ĝi fariĝis la parto de Japanio ĝis mil naŭcent kvardek kvin (1945). En ĉi tiu jaro la nordan parton de la lando la rusaj armeoj kaj la sudan parton la amerikaj armeoj okupis, kaj ili dispartigis la landon.

En la jaro mil naŭcent kvindek (1950) pro la konflikto inter ili komenciĝis la korea milito, sed nek la unua nek la alia venkis. En mil naŭcent kvindek tri (1953) oni subskribis la interkonsenton (pakton), kaj ilia kontakto depost tio ne estas bona.

La defenda sistemo de Sud--Koreio tiun servas, ke ĝi defendu sin kontraŭ la Nord-Koreio, pro tio en la lando oni devigas la soldatojn servi du jarojn. La armeo klerigas la plej bonajn kaj plej fortajn soldatojn (700 miloj aktivaj kaj 3 milionoj rezervistoj). Ĝi havas la plej bonan soldatan koalicion kun Usono (USA).

Ekonomio de Sud-Koreio

Post la korea milito Koreio estis la plej malriĉa lando sed ĝi ricevis internacian helpon kaj subtenon. Per diligentaj laboroj estiĝis la plej evoluanta ekonomio kaj tiel Sud-Koreio aliĝis al aziaj "malgrandaj tigroj".

Fortiĝis la peza industrio: petrolkemio, fervojo, kaj ŝipfabrikado. En Koreio estas grava la aŭto-fabrikado (Hyundai, SsangYong, Kia). Estas konataj ĝiaj elektronikaĵoj, inteligentaj telefonoj kaj integritaj cirkvitoj (IC): LG, Samsung. Pro la rapida industriigado kaj trafiko ĝia aero malpuriĝis , sed oni gardas jam la naturon.

La rolo de la agrikulturo reduktiĝis, pro tio bezono de la nutraĵo sep dek procentoj (70%) el importado devenas. Ĝia plej granda komerca partnero estas Usono.

La publika sekureco de Koreio estas bona. La lando evoluas rapide. Tie estas troveblaj multaj vidindaĵoj, pro tio ankaŭ la turismo kaj fremdultrafiko rapide evoluas. Sud-Koreio estas la sesa, plej vizitata lando en Azio.

Gastronomio de Sud-Koreio

La loĝantaro de Koreio manĝas varie kaj sane, estas videblaj ankaŭ la efikoj de japana kaj ĉina gastronomioj. Oni manĝas spicite. La plej konataj manĝaĵoj estas kimĉio, rizo, algo, fiŝo, kokino, bibimbapo.

Religio en Sud-Koreio

Kvardek sep procentoj (47%) de la loĝantaro ne estas religiemaj. Dudek tri procentoj (23%) el ili estas budaistoj, dek ok procentoj (18%) protestantoj kaj dek unu procentoj (11%) katolikoj kaj plua unu procento (1%).

La Seula urbodomo

Seulo situas en la nordorienta parto de Sud-Koreio. Seulo signifas: ĉefurbo. La urbon trakuras la rivero Hangang kaj ĉirkaŭas montoj. Mi povis ekkoni la ĉirkaŭajn montarojn en Seulo, kaj ankaŭ Nansan montaron, ĉar mi faris solecajn ekskursojn, kaj mi fotis pri ĉi tiu okazo. En Seulo vivas dek milionoj da homoj. Kun la antaŭaj urboj (Incheon kaj Suwon) estas la loĝantaro dek kvin milionoj, kaj la popoldenseco estas tre alta. En ĉiuj seulaj veturiloj estas klimatizado. Seulo havas ĉirkaŭ dek ok metroo-liniojn. La homoj estas tre ĝentilaj kaj helpemaj. La urbo havas multajn verdajn areojn. La Someraj Olimpikaj Ludoj estis en mil naŭcent okdek ok (1988) en Seulo. La hungaraj sportistoj ricevis dek unu ormedalojn.

Oni aranĝis „Formulo -1, Tour“-on de Koreio, biciklan kaj bezbalajn konkurojn.

La plej populara batala arto estas la „TaeKwon Do“, kiu denevas el Koreio, kaj ĝi estas ekde du mil (2000) olimpika sportobranĉo. Antaŭe mi faris ĉi tion, ĝi estis mia ŝatata TaeKwon Do sporto. Ĉi tiun sporton fondis Ĉo Hong Hi, la soldata generalo, kaj naŭ „daneo“-majstro.

La homoj uzas la necesejojn en la urbo ĉie senpage (ankaŭ en la metroo kaj en la fremdultrafikaj lokoj).

Antaŭ la kongreso, la 19-an de julio ni ekveturis per aviadilo de Budapeŝto ĝis Seulo. Ni transveturis Dubai-on, kaj alvenis en Seulon la 20-an de julio.

La sep anoj de la hungara karavano estis:

Profesoro D-ro Gábor Márkus, honora prezidanto de HEA, S-ro János Nagy vicprezidanto de HEA, S-ino Enikő Zengő Sereghy estrarano de HEA, S-ino Györgyi Koltai Asztalosné, S-ino Ildikó Pusztai, S-ino Ilona Köles, S-ino Erzsébet Hellenpach Sóter.

La gvidanto de la karavano Mária Eszes la prezidantino de Hungaria Esperanto – Asocio (HEA) bedaŭrinde ne povis partopreni pro ŝia malsaniĝo. Poste mi ricevis meŝaĝon, ke S-ino Erzsébet Székely kaj sia filo ankaŭ partoprenis.

Mi alvenis al la konstruaĵo de Hankuk Universitato, kie akceptis min la Loka Kongresa Komitato kaj la prezidantaro de Korea Esperanto--Asocio (KEA): S-ino Oh Soon--Mo vicprezidantino kaj S-ro Kang Hongu (Kanguruo) vicprezidanto.

En la dua tago mi helpis kaj en la Libroservo kaj dum la ekspozicio de la fotoj. Nokte ni kune vespermanĝis. Dum la kongreso min gastigis unua vicprezidanto de KEA. Mi ricevis de ambaŭ vicprezidantoj la plej grandan helpon kaj subtenon, kiujn mi sincere dankegas.

La 102 -an Universalan Kongreson oni aranĝis en Seulo en la „Campus” de Hankuk -Universitato.

En la oka konstruaĵo de la Universitato funkciis la akceptejo, la libroservo, ekspozicioj, ejoj por la prelegoj, sekciaj kunsidoj, kaj por la komitata forumo. El ĉi tiuj, kiuj plaĉis al mi estis: Kajto koncerto, Japana kulturo, Afrika movado, Teo kaj Amo, ktp.

Plej grandaj aranĝoj estis en la Salono Zamenhof (Obama), ekzemple: koncertoj, La Nacia Vespero, La Internacia Arta Vespero kaj Azia Vespero, kiujn mi vizitis.

Por mi la plej interesa travivaĵo estis la korea, 5000-jara danco, kiun dancas, kantas kaj ludas nur virinoj. En la praepokoj oni dancis ĝin por abunda rikolto. La nomo de ĉi tiu danco estas „Ganggangsullae”. Ĝi fariĝis la kultura simbolo de Koreio.

Multfoje mi ekskursis en la ĉirkaŭaj montoj de Seulo, kaj en la malproksimaj montaroj. Mi povis vidi la urbon desur la montaro. En la montaro estis videblaj akvofaloj, fontoj, kaj belega panoramo.

La partoprenantoj de la kongreso estis ĉirkaŭ 1173 kaj la kongreson vizitis 62 landoj. Laŭ mia opinio la kongreso estis sukcesa. Mi ricevis utilajn spertojn dum la kongreso.

La hungara karavano partoprenis kvar postkongresajn tagojn de la 13-a Internacia Esperanto Renkontiĝo de Meditado. Kio estis la plej granda travivaĵo por mi? Ni ekveturis per tri aŭtobusoj kune kun ĉirkaŭ cent partoprenantoj. La unua stacio estis urbo Iksan, kie ni vizitis nacian ĉefcentron de la budhismo. Ĝi havas belegan universitaton kaj belegan kulturparkon. Ni vizitis la lagon, kaj tie oni faris foton pri la grupo, kaj estis interkona vespero.

“Ŭonbulismo komenciĝis per la granda eklumiĝo de Sotesano en 1916. Li naskiĝis la 5-an de majo 1891 en fora vilaĝo de Koreio, siatempe minacata per imperiisma invado. Ekde la infanaĝo li havis demandojn pri la naturaj fenomenoj de la universo kaj senĉese faris ĉiajn penojn por solvi ilin.

Hodiaŭ ŭonbulismo estas unu el la kvar grandaj religioj en Koreio, kaj kun temploj en dekoj da landoj strebas por pli kaj pli disvastiĝi en la mondo.

Ŭonbulismo igas homojn kredi, tutkompreni kaj praktiki la veron de unu cirklo. La vero manifestas sin en ĉiuj estaĵoj kaj ili estas interligitaj per ‘bonfaroj’ . Sotesano dividis la bonfarojn de ĉiuj estaĵoj en la kvar bonfarojn, kiuj estas ĉiela –tera bonfaro, gepatra bonfaro, kunvivula vivo. ” - Choe Taesok (Ŝtonego)

Mia opinio: La homoj devu kredi nur en bonfaro.

En la dua tago ni rigardis la korean nacian, tradician vilaĝon kaj veturis al urbo Jongsan.

En la tria tago frumatene ni faris ekskurson en la montaro. Tie ni vidis la leviĝantan sunon, kaj poste komencis la programon per meditado, kaj alveturis al bordo de la Flava maro. Posttagmeze mi prelegis anstataŭ nia prezidantino S-ino Mária Eszes, kiu dumtempe, bedaŭrinde malsaniĝis. La temo de la prelego: la kontakto de religio kaj arto. Dum la prelego mi prezentis filmon pri la religio kaj la arto. Tra la filmo oni povis ekkoni ankaŭ la arton de ŝi.

” La radiko de ambaŭ ekzistas en la homa animo. Ĝi estas spirita stato, el kiu denevas grandaj pensoj. Religio kaj arto estas en la plej strikta, plej interna rilato. *Ilia konsistiga elemento estas la fantazio, per kiu la kreanto – ĉu pentristo, ĉu skulptisto, ĉu literaturisto – flugas en nemezurebla alteco. La religioj de la nacioj estas diversaj, kompreneble same diferencas ankaŭ la artoj.*” – Mária Eszes (prezidantino de Hungaria Esperanto Asocio)

La filmo prezentis la vivon de Sankta Maria. La pentraĵoj de famaj pentristoj estas troveblaj en diversaj preĝejoj, bazilikoj kaj muzeoj de grandaj urboj de la mondo. Dum la filmo kantis la esperanta koruso Fónix (Komló) pri Sankta Maria. Ĉi tiun prelegon mi prezentis volonte, ĉar mi havis sukces-travivaĵon. Mi informiĝis pri la interesiĝo de la homoj pri la temo, ja ni ĉiuj scias, ke la kontakto de la religio kaj la arto estas grava afero en Esperanta mondo. Mi tre ĝojas ke ni povis partropeni la 102-an Universalan Kongreson de Esperanto, kaj eterne memoras la belegajn travivaĵojn kaj utilajn spertojn.

En la lasta tago de meditada renkontiĝo ni povis aŭskulti interesan prelegon de Profesoro D-ro Gábor Markus, kiu estas la honora prezidanto de Hungaria Esperanto -Asocio. La titolo estis socia krizo en Eŭropo pro popolmigrado.

Post la bongusta tagmanĝo ni alveturis al Seulo, kaj poste per aviadilo tra Dubai, ni revenis al Budapeŝto.

Skribis: János Nagy vicprezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio